Písek

La klubo nuntempe ne okazigas apartajn lokajn kunvenojn, tamen aktivas.
Post fizika translokiĝo en majo 2025, la ĉefa aktiveco de la jaro estis **unuaetapa aranĝado de la meblaro kaj materialoj de la kluba bibliotéko kaj arkivo** en la Karlova str. en Písek kaj **pretigo de la ejo por la oficiala malfermo kaj vizitoj.** Tiu okazis la **11-an de aprilo 2026** kadre de la **seminario Sabla Printempo.** Denove pri la temo *Esperanta literaturo kaj librokulturo en la 21-a jarcento.* La aranĝo trapasis sukcese kaj inspire kaj bonvenigis novajn interesitojn el Prago. Parto de la programo denove okazis en la Urba bibioteko, kies direktorino montris intereson pri Esperanto kaj pri plua kunlaboro kaj informis pri Esperanto en la bibliotekaj FB-paĝo. Denove estis donacitaj kelkaj libroj pri aŭ en Esperanto al la Urba Biblioteko. Plua kunlaboro planatas.
Por la partoprenantoj estis pretigitaj por trarigardo specimenoj de la interesaj klubaj fotaĵoj, kolektmaterialoj, vojaĝprospektoj kaj historiaj gazetoj kaj libroj. La plej grava progreso okazis en prilaboro de la **gazetaro.** Preparatas nun ciferecigado de **sonkasedoj.**
Aparta metala **ŝildo** surdoma pretigita far la urba oficejo faras nun senpaganl **reklamon por Esperanto** en la turisme vigla strato.
Kiel jam anoncite, la ejo, posedata de la urbo, destinitas ***unuavice por stokado,*** *duavice por studado, historia esplorado, libropruntado, prilaboro de la arkivo kaj klubaj kolektoj, ciferecigado kaj akcepto de vizitantoj. La financado okazas memstare private, sensubvencie kaj sendepende de ĈEA Surmure de la ejo estis pendigitaj* ***12 paneloj*** *(do duono) de la antaŭa* ***migra ekspozicio*** *„Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ Tamen ĝi viziteblas nur individue kaj nur laŭ anticipa interkonsento. La ejo havas sudbohemian agadsferon kaj neniel celas konkurenci al la Esperanto-Muzeo en Svitavy.*
Esperanto-kontaktoj kaj kunlaboro:
Piu estas tenataj enlandaj kaj eksterlandaj **korespondaj kontaktoj** de la klubo kun kluboj kaj individuoj, precipe en Germanio, Pollando, Belgio, Nederlando kaj Brazilo.
Geedzoj Dvořák faris kadre de feriado apartan viziton en **Nová Dubnica** ĉe Peter Baláž kaj la sidejo de E@I kaj la Esperanta arkivo kaj bibliotéko de **SKEF** (al kiu faris la klubán donacon) kaj pridiskutis eblan kunagadon.
Estrino de la klubo Pavla Dvořáková kontribuis per 4 prelegoj kaj kantprogramoj al la agado de la **E-Klubo en Prago** pri temoj kulturaj kaj zamenhofaj kaj al la Praga Bulteno kaj al la programo de la **111-a UK** en Graz kaj plu partoprenas en **informaj aktivecoj de ĈEA.**
Engaĝiĝas kromĕ en preparo de la **memorprogramo** omaĝe al la neĝisvivita lOOjariĝo de la eksa vicprezidanto de la klubo **Miroslav Smyčka** okazonta 1.10.2026 en la Teatro U Valšů kaj en interreta diskonigo de lia vivo kaj agado.
3 klubanoj kromĕ kunlabore aktivis en organizado kaj programo de la printempa **Lingva Seminario en Pacov.**
Jaroslava Malá plu daŭrigas realigon de **sonartikoloj** por Esperanta Retradio kaj registradon de artikoloj por nevidantoj.
27.8.2026 Pavla Dvořáková, prezidantino